

La heroo vivo de Henri Dunant, 2-a parto
Claude Gacond, 97-a radioprelego, 1964.10.07 & 10

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Claude Gacond rakontas pri la heroo vivo de Henri Dunant. Vi aŭdas la duan elsendon pri tiu temo.

Henri Dunant ne naskiĝis, kiel Jean-Jacques Rousseau, en la laborista kvartalo Saint-Gervais. Tamen pro la okupo de siaj gepatroj li havis intimajn rilatojn kun la malriĉa klaso en Ĝenevo.

La familio Dunant troviĝis loĝe kaj spirite en la limo inter la alta kvartalo aristokratema kaj pasie protestanta, kaj la malalta kvartalo de la komercistoj. La patro Dunant estis riĉa negocisto, kiu havis sidlokon en la reprezenta konsilantaro, konsilantaro, kiu fakte nenion reprezentis escepte la de si mem elektitajn familiojn. Tiu politika agado ne sufiĉis por pleniĝi la vivon de tiu ne tro okupita komercisto. Li do interesiĝis al karitato. Oni eĉ povas diri, ke li sin donis preskaŭ entute al tiu nepagita kaj eĉ sufiĉe elspeziga okupo. Sed tamen sinjoro Jean-Jacques Dunant estis tro inteligenta, tro realista, por esti vera idealisto. Kiel multaj tiamaj ĝenevanoj li suferas pri sia materialismo kaj provas ĝin kompensi per agema moralo, kies profitantoj estas la malriĉuloj, la orfoj kaj la vidvinoj. Tiu karitato alportas al la riĉa donanto facilan memkontentemon. Donante monon al almozpetanoj li havas la senton esti superulo. Sed ni ne diras tion por kritiki la sintenon de tiu malavarulo. Ni troviĝas en la komenco de la deknaŭa jarcento. Ekzistas terura mizero. Sinjoro Dunant konscias pri tiu manko kaj sisteme organizas la karitaton. Li konas kvazaŭ ĉiujn familiojn, kiuj loĝas en lia reg-kvartalo kaj agas strategie : tia strato, tia domo, tia etaĝo, tia ĉambro valoras unu, du, tri, dek almozojn. La mizeruloj venas al li. La georfoj dependas de li. Li serĉas por ili adoptajn gepatrojn kaj protektas ilian monon kontraŭ spekulado ĝis ilia matureco.

Anne-Antoinette, la patrino, helpas sian edzon en tiu malfacila tasko. Ŝi vizitas la helpatajn familiojn kun Henri, kiu tiel vidas la malriĉecon. Jam en tiu epoko la infano desegnas en sia spirito helpoplanon, al kiu la tuta societo devus partopreni. Li komprenas, ke karitato ne sufiĉas por kuraci tiun socian malsanon. Li serĉas la kaŭzon de tiu malsano, kaj kiam pli poste li kuraĝos ĝin esprimi, li perdos multajn amikojn. Sed nun ni estas en 1840. Li nur estas 12-jara. Li skizas siajn ideojn. Post lia morto, ekzamenante liajn manuskriptojn, oni malkovros unu el tiuj skizoj. Henri Dunant ĝin verŝajne konservis, ĉar ĝi jam esprimis liajn profundajn sentojn.

Multajn jarojn poste li skribos en siaj memoraĵoj restintaj manuskriptaj : *« Koncerne nin (anstataŭ paroli pri si mem, li uzis la esprimon ni, kiu estis pli universala), koncerne nin, ni deziras vidi grade alveni, sen skuo, la abolicion de la ekonomiaj kaj sociaj sklavecoj, la plibonigon de la sorto de senĉese kreskanta ularo. Ni deziras per pacaj rimedoj kapabli forviŝi iom post iom la sociajn diferencigojn, unuigante en komuna agado la malriĉulon kaj la riĉulon, la kapitalon kaj la laboron. »*

Nun nia knabeto sidiĝas ĉe la mizeruloj sur seĝo. Li aŭskultas virinon, kiu plore rakontas siajn suferojn. Li vidas malsanulojn, kiuj kuŝas sur la planko pro manko de lito. Li sidas, la manoj sur siaj genuoj kaj aŭskultas banalajn ĉiutagaĵojn, kiujn li duonkomprenas. Konfuze li komencas senti, ke morala helpo tiom valoras por la resanigo de tiuj malsanuloj, ol la pocioj de la apotekisto aŭ la sangeltiro de la kuracisto. Kiam la vizito finiĝas, li premas la manon de la mizerulo, afable ridetas sin ekklinante, kaj rigardadas la vizaĝon de la suferanto, fascinata de tiu emociega spektaklo, la spektaklo de homo en doloro.

1846. Henri Dunant dekokjaras. Li serĉas amikojn en medio, kiu sampensas. Li trovas la **Societon de la almozoj** kaj partoprenas la laboron de ŝok-brigado. Tiu grupo ĉefe varbas siajn membrojn inter la junularo de la riĉaj familioj de la alta kvartalo. Dum la tago tiu religiema junularo kalkulas la interezojn de la bankistoj aŭ la profitojn de la patra komerco. Vespere ĝi hazarde disdonas kelkajn el tiuj riĉaĵoj sur la tablojn de la mizeruloj. Henri

La heroa vivo de Henri Dunant, 2-a parto
Claude Gacond, 97-a radioprelego, 1964.10.07 & 10

elspezas sian ŝparmonon al tiu okupo. Li vizitas siajn malriĉulojn provante mildigi kelkajn mizerojn. Li pacigas, kuraĝigas, admonas. Kiam la monujo ne plu sufiĉas por tiu tasko, tiam li alarmas siajn gepatrojn, sian amikaron, la bonfaradan oficejon aŭ la pastaron. Sed tion farante li imagas organizaĵon, kiu pli taŭge funkcius, ol tiu **Societo de la almozoj**. Oni retrovas dokumentojn verkitajn de li en tiu epoko, kiuj montras, ke li pensis necese ne kreskigi la **Societon de la almozoj** mem, sed disvolvigi ĝian agadon, aldonante al ĝi aliajn agadojn. Li ne volis krei novan movadon, sed uzi jam ekzistantan societon por ĝin adapti al la novaj cirkonstancoj. Henri Dunant pravas por la unua fojo sian kapablon por diplomatio je la servo de ideo.

Poste li skribos en siaj memoraĵoj : « *Ni volus konduki ĉiun homon al ĉiam pli alta grado de moraleco, lumo kaj bonstato. En tiu celo ni studas la praktikajn reformojn, kiuj rilatas la laborkondiĉojn, same kiel ĉiujn justajn aranĝojn, por povi alveni senskue al la solvo de la malfacila problemo de la paŭperismo, al la ekonomia justeco sen leĝa karitato, al la libera disvolviĝo de ĉiuj homoj. Ni volus vidi fondiĝi ĉie, kie ili ne ekzistas, institucioj, kies celo estas havigi laboron al tiuj, kiuj ĝin ne havas, viroj kaj virinoj. Ni volus permesi al la plej malriĉaj, al la izoluloj, ŝpar- kaj asekur-povon pli bone, ol ili hodiaŭ tion povas fari ; kuraĝigi la societojn por mutuala helpo en la diversaj labor-kategorioj de la urboj kaj de la kamparoj inkluzivante iliajn familiojn ; asekuri honestan bonhavecon al la maljunaj kaj malsanaj gelaboristoj... »*

Ni multobligos la tekston de tiuj elsendoj pri la heroa vivo de Henri Dunant kaj ĝin sendos al la petantoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-